Фёдор Сологуб,

# La disipanto

*tradukita de Michel Duc Goninaz*

Mi la korpon liveris al ŝimo,
Disipinte trezoron de l' sort'.
Jen mi staras ĉe la noktolimo
En nudeco, senhelpa, sen fort'.

Kaj mi petas de la Dia graco
— senkomparas la preĝa sincer'! —
"Nur iomon da forto donacu
Al mi, kiun lacigas la ter'.

Sub ĉi-teraj ĉagrenoj mi sklavas,
Por mi troas la tera plenum',
Sed printempoj min, ho kiom! ravas,
Kaj freŝigas min akva brakum'.

Kiom ruĝe aŭroroj ĉi ardas,
Kiel revas jasmena arbet',
Kiel milde lazuro rigardas,
Kiel kisas la lipa impet'!

Dezirata eĉ pli, ol kisado,
Kaj aroma eĉ pli, ol jasmen',
Estas forto de sonĝa persvado
Kaj de versoj la milda refren'.

Ĉar Vi, Di', kompatemas, kaj vere
En Vi — gloro kaj fort', lumoflu'.
Donu iom da vivo surtere,
Por ke kantojn komponu mi plu!"

...

Фёдор Сологуб,

# Расточитель

Измотал я безумное тело,
Расточитель дарованных благ,
И стою у ночного предела,
Изнурен, беззащитен и наг.

И прошу я у милого Бога,
Как никто никогда не просил:
„Подари мне еще хоть немного
Для земли утомительной сил.

Огорченья земные несносны,
Непосильны земные труды,
Но зато как пленительны весны,
Как прохладны объятья воды!

Как пылают багряные зори,
Как мечтает жасминовый куст,
Сколко ласки в лазоревом взоре
И в лобзании радостных уст!

И еще вожделенней лобзанья,
Ароматней жасминных кустов
Благодатная сила мечтанья
И певучая сладость стихов.

У тебя, милосердного Бога,
Много славы, и света, и сил.
Дай мне жизни земной хоть немного,
Чтоб я новые песни сложил!"

...

*Traduko de la Rusa poemo "Расточитель" de* Фёдор Сологуб *(Fjodor Kusmiĉ Teternikov, ∗1863-03-01 – †1927-12-05) en Esperanton de* Michel Duc Goninaz *(∗1933-09.06) en 2003.*

*Arg-385-759 (2007-02-08 12:35:49)*

*Tiu ĉi traduko aperis en la revuo "La ondo de Esperanto", en 2003. Laŭ sciigo de s-ro Michel Duc Goninaz, la verkinto de tiu ĉi traduko, mi, Manfred Retzlaff, korektis preseraron en la tria stofo, nome "printempo" anstataŭ ĝuste "printempoj". S-ro Duc Goninaz atentigis min pri tio per retletero de l' 07.02.2007. Tiu preseraro ankoraŭ estis en la retejo* `http://www.esperanto.org/Ondo/Ondo/106-lode.htm#106-36`*, el kiu mi prenis la tradukon.*

*Verkinto de tiu ĉi Rusa poemo estas* Фёдор Сологуб *(Fjodor Kusmiĉ Teternikov, ∗1863-03-01 – †1927-12-05), publikigita 1917-06-13.*

*Arg-385-757 (2007-02-06 16:46:33)*

*La vera nomo de la poeto estis: Фёдор Қузъмич Тетерников (Fjodor Kusmiĉ Teternikov), Фёдор Сологуб (Fjodor Sologub) estis lia kaŝnomo (pseŭdonimo).*